[noto] fonto: "La Lumo Orienta", Jaro 4:N-ro 4 (1934)

# *Kio estas sufero?*

de **Ĉion Macubara**

1

Ofte ni renkontas tian momenton, ke ni estas devigataj serioze pripensi homan vivon aŭ nin mem: Ĉu estas por ĝoji aŭ por suferi, ke ni naskiĝis kiel homoj?

Se ni taksos homan vivon laŭ ĝojo kaj sufero, por ni troviĝas nenio tiel sensignifa kiel nia vivo. Multaj aspiradas feliĉon, tamen kiam ili ekkaptis ĝin, ĉe la sama momento komenciĝos nova sufero aŭ ĉagreno kaŭzita de la feliĉo. Kiam oni gajnis riĉecon, oni suferas pro la riĉeco; de kiam oni favoris sin per honoro, tuj sekvos ombro de ĉagreno; ofte ĝojo de feliĉo ne daŭras longe, dum obstina ja estas amara pento. Ĉion ĉi tion, mi pensas, kaŭzas serĉado de feliĉo kaj ĝojo nur en la regno videbla kaj sentebla. La regno kiu estas videbla per fizikaj okuloj estas malvasta. La eterna valoro neniam estas perceptebla, se ni ne malfermos al ni la animokulon. Ĝi ja estas akirebla nur en la regno superinta ĝojon kaj suferon, venkon kaj malvenkon, profiton kaj malprofiton. Tia malfermiĝo de animokulo okazas nur tiam kiam oni metas sin en la suferoj. Ĝojoj neniam servos alie ol ebriigi nin. Ĝojoj troviĝas en supraĵo de homa vivo, dum ĉagrenoj okupas sin en profundo de la vivo.

2

Sanktulo Ŝakjamunio postlasis por ni eterne brilantan aforismon: “Se vi volas ekscii kaŭzon en estinteco, vidu rezulton en estanteco.” Tio ĉi ja estas abismo de profunda saĝeco. La nobla saĝeco, ke ĉiuj kiujn ni nun ricevas estas rikolto por kiu ni antaŭe plantis, devas esti ŝlosilo per kiu ni povas malfermi ĉiujn problemojn en nia vivo kaj ĉe ni mem.

Nu, ni provizore supozu, ke iu malfeliĉa okazintaĵo venis sur nin. Esence malfeliĉo estas konscio. Ĝi neniam troviĝas aparte de ni mem. Konscii ĝin kiel malfeliĉon estas tio, ke la malfeliĉo venis al ni malgraŭ nia atendado al feliĉo. Kaj tiuj kiuj suferas pro tio, sole estas ni mem. Se jes, povas konvinkiĝi, ke tio kion ni nun suferas estas tute prava kaj natura, nome ni ricevis, kion ni devas ricevi. Ne troviĝas pli profunda saĝeco ol sciiĝi, ke malfeliĉo neniam povas difekti nian propran esencon, sed kiu difektas nin mem, nur estas nia konscio. La saĝeco estas tiu kiu sup;eras ĉion. Ĉar ĉe ni ne troviĝas pli nobla saĝeco ol percepti realecon de homa vivo kaj ni mem. Tie ĉi ekfloras la plej alta memkonscio, ke ĉiuj en la vivo senescepte devenas de ni mem. Kaj de tiu memkonscio naskiĝos nobla kuraĝo, ke ni povos preni sur nin ĉiujn respondecojn por la homa vivo. Tiam la korstato, kiun Konfucio diris, “Mi ne riproĉas homojn, nek ofendas Ĉielon,” ankaŭ nature sin

montros al ni. Eĉ Konfucio povis akiri tian memkonscion post sia suferado en la plej mizera vivo, kiun li vivis en kamparo de Chen-chi.

Plie la vera kuraĝeco, ke ni prenas sur nin ĉiujn en la homa vivo, ŝanĝos estantan vivon al pli bona stato. Kaj finfine eksciinte, ke por plenumi tion nenia rimedo troviĝos krom ŝanĝiĝo de ni mem, ni ekhavos deziron revolucii nin mem. Nu, ĉi tiu deziro jam ne estas tiu por la bono propra.

3

Jen, tiam senkonscie ni metos nin en io pli alta ol ni mem, ĉar en la okazo la sintenado temi memon estas vigla agado por io pli alta ol memo. Kaj la sintenado estas tiu de donacita kaj estas graco.

Ĉi tiun pli altan ol memo komencis rimarki multaj el nuntempaj okcidentaj filozofoj, kiuj okulfrape fariĝadas religiemaj. Dro Ikutaro Niŝida, unu el famaj filozofoj en nuna Japanujo, nelonge publikigis sian opinion jene: - Io pli alta ol memo estas objektiva spirito, kiu estas rigardata kiel radiko de nia memkonscio, kaj ĝia enhavo estas tiu, kiu estas grand-karaktera, kaj kiu neas ĝisoste memon en la fundo de menso sed samtempe produktas memon. Sed por ni ĝi devas esti tia, kia igas nin veki, sin okupante en nia interno kaj samtempe devas esti votivo de hodhisatvo (absoluta kompato) eltiri nin el pekemo, estante super ni. Sekve substanca aŭ koncepta Budho kaj Dio, kiuj troviĝas aparte de tiu, interne ekzistanta kaj universala, nur devas esti idoloj produktitaj de homa utilismo.

Ĉi tiu sintenado, kiu temas memon, nome tiel nomata "avideco al vojo", nature havigas al ni la emon facile kapti ŝancon, ke nin introspekti, profundigi kaj nobligi pere de diversaj okazintaĵoj en homa vivo, kiuj sinsekve aperadas antaŭ niaj oluloj. Tiu ĉi religia humileco ankaŭ devas esti graco. Nur tiu, kiu estas humila, povos havi plenigitan ĝojon en sia koro. Jen tiam ĉiuj aferoj en la homa vivo fariĝos instruoj de budhoj, kaj ĉiuj agoj kaj paroloj de homoj fariĝos modelaj kaj normoj por juĝi bonon de malbono. Jen tiam sufero kaj ĝojo, profito kaj malprofito, venko kaj malvenko, gajno kaj perdo, k.t.p., ĉiuj senŝanĝe fariĝos instruoj; eĉ vivante kun ili, ni neniom estas malliberigitaj de ili, sed prefere ili servos nurti al ni la animon.

Ja, povas diri: - eĉ laboro aŭ industrio - ĉiuj estas vojo por budheco; surteraj pasioj nome estas lumiĝo - bodhio; je morto kaj naskiĝo oni vidos nirvanon.

Jes, vere estiminda ne troviĝas ekstere, sed interne. Nu, do sole elektita, favore donacita estas vera vivo, t.e. memo, ĝi ja estas absoluta unika gtrezoro en la universo. La deziro, kiu karesas tian veran vivon, senŝanĝe estas avidkoro al la vojo.

4

Prove mi demandos: -Kion oni povas akiri post tiel senĉesa avidado ĉiam pli?

Respondo: - Rigardu vin internen!

Ĉu nur tiu avidkoro ne estas favore donita? Ĉu ĝi ne estas la plej nobla trezoro, nature donacita, malgraŭ tio ke ni ne postulas? Tiu kiun ni trovis en ekstero, estas efemera. Tiam kiam ni profundigis nin ingternen, al ni restos nur eternaj. Ju pli ni nin pfoundigos, des pli ni nin limigos. Kiel ĉagreno solviĝos nur en ĉagrenado, kaj

kiel sufero solviĝos nur en suferado, la teniĝo mem avidanta al la vojo naskos kontentiĝon. Je tiu ĉi sincerega avidkoro naturo kaj homoj sin montras kiel kompatema patrino, kiu donas lakton por nutri nian internan vivon. Tio ĉi ja estas okulta dolĉeco gustumebla nur al tiuj kiuj enkorpigis tion al si. Aspirado al la vojo estas Lumo. Ĉiuokaze ni homoj povos trovi eternan lumon nur en suferoj kaj ĉagrenoj. Malvasta ja estas ekstero, senlime vasta kaj profunda ja estas interno!

Ni povos senlime Ĝin tuŝadi, nur kiam ni senĉese aspiradias internen. Jen tiam ni unue povos percepti, ke la sufero kaj ĉagreno estas favoraj donacaĵoj dankindaj kaj laŭdindaj. Tio ja estas unu el viglaj flankoj de la forto, kiu superigas al ni la memon, kiu superigas al ni la vivon.

Fosu, kie vi staras, tie estas fonto de la vera vivo!